

Informoj pri la membreco en ESPERANTO INTERNACIA

Aliĝante ĉe adresaro.org vi aŭtomate fariĝas membro (Simpatianto) de la internacia fondaĵo (neregistara organizo) ESPERANTO INTERNACIA. ESPERANTO INTERNACIA subtenas agadojn rilate al Esperanto-informado kaj Esperanto-instruado. Ĝi volas ke pli da homoj en la mondo parolu kaj uzu la internacian lingvon Esperanto.

Temas pri idealisma organizo. Personoj, kiuj pretas kontribui iomete mone povas aliĝi kiel "Amiko" de la fondaĵo. "Amikoj" pagas etan monsumon. ESPERANTO INTERNACIA garantias laŭstatute, ke la mono grandparte estos uzata por la celoj. Por administraj kostoj la fondaĵo maksimume rajtas elspezi 25%. "Amikoj" havas kelkajn avantaĝojn ĉe la adresaro.

- a) Amikoj povos plene vidi ĉiujn kontaktinformojn (se la uzantoj tion permesas), kiel adreso, telefono, skajp-konto kaj aliaj.
- b) Amikoj havos aliron al speciala sekcio por "Amikoj" (ankoraŭ realigota)
- c) Amikoj povos vidi kaj kontakti personojn, kiuj ne parolas Esperanton, sed donas servojn, kiel ekzemple senkostaj tranokteblecoj.
- d) Amikoj subtenas la agadon de Esperanto Internacia, do ĉefe la Esperanto-informadon kaj la Esperanto-instruadon.
- e) Vi fariĝos plena membro de internacia komunumo!

La normala baza kotizo por "Amikoj" estas tre modesta. La baza kotizo estas nur 25,00 EUR. Tiu kotizo validas por jenaj landoj: Aŭstralio, Eŭropa Unio (ĉiuj landoj sen Bulgario kaj Rumanio), Islando, Israelo, Kanado, Norvegio, Novzelando, Suda Koreio, Svislando, Usono.

La kotizo B (por aliaj landoj krom afrikaj landoj) estas: 15,00 EUR.

La kotizo por afrikaj landoj C estas: 10,00 EUR.

Tamen personoj el ĉiuj landoj povas peti aliĝon je reduktita tarifo aŭ eĉ senkoste, se ili laboras por Esperanto. Pri detaloj kontaktu la administran sekcion de Esperanto Internacia je la adreso: administrado@adresaro.org

Krom la normalaj kotizoj ekzistas diversaj subtenkategorioj. Vi povas fariĝi "arĝenta", "ora" aŭ eĉ "verda" amiko. (40,00 EUR / 60,00 EUR / 80 EUR) kaj tiel pli subteni la agadon de ESPERANTO INTERNACIA. Ankaŭ eblas fariĝi dumviva "Amiko". Kontakti la administran sekcion de ESPERANTO INTERNACIA por ekscii pliajn detalojn.

PAGVOJOJ:

Pri pagoj ekzistas diversaj eblecoj:

Pago al **germana bankkonto:**

Kontoposedanto: Stiftung Mondo

IBAN: DE21600901000151100004

BIC: VOBADDESS

ĉe Volksbank Stuttgart

Menciu: Esperanto Internacia

Pago pere de **Paypal:** stiftung-mondo@web.de (Bv. mencii la kaŭzon de via pago)
kaj informu al:

financoj@adresaro.org

Pago al UEA:

Uzu la normalajn pagvojojn al UEA; se vi jam havas bonhavan ĉe UEA petu al UEA sendi monon al la konto eint-o, sendante kopion de via mesaĝo al:

financoj@adresaro.org

Skribu al ni, se vi havas pliajn demandojn!